Nederlanda Katoliko

Maandblad van de Nederlandse Bond van Katholieke Esperantisten „NEDERLANDA KATOLIKO", gevestigd te 's-Hertogenbosch

Opgericht 29 Augustus 1909
Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd

Redactie: A. F. Leideritz Jr., Vechtstraat 5, Amsterdam-Z.
Vaste medewerkers: J. S. Jansen, Amsterdam en Dr W. J. A. Manders, Venlo

ESPERANTO KAJ JARKUNVENO

En 1947 mi ĉeestis la F.L.E.-kongreson en Heerlen. En ĉiuj kunvenoj oni parolis nur esperanton, kaj ankaŭ ekster la kongresejo oni povis renkonti multajn grupojn vigle konversaciantajn en la internacia lingvo. En 1949 mi partoprenis la kongreson de L.E.E.N. en Haarlem. Ankaŭ ĉe tie la sola kongreslingvo estis esperanto, kaj ĝuste kiel en Heerlen mi ĉeestis jarkunvenon en kiu ĉiuj raportoj, ĉiuj proponoj kaj ĉiuj diskutoj okazis ekskluzive en la lingvo de Zamenhof. Unu semajnon poste mi estis en Eindhoven. La sabata festvespero organizita de „Suda Kruco" havis miksitan karakteron: alternis nederlandaj kaj esperantlingvaj prezentadoj; la publiko evidente ŝatis la esperanto-programon, sed preferis mem konversacii nederlandlingve (dum la paŭzoj kompreneble!). La dimanĉa jarkunveno okazis tute en nederlanda lingvo. Se mi ne eraras aŭdiĝis nur dufoje kelkaj esperanto-vortoj: la unuan fojon, kiam s-ro Baas, prezidanto de L.E.E.N., laŭtlegis esperantlingvan rezolucion akceptitan de la L.E.E.N.-kongreso, kaj poste daŭrigis sian paroladon en esperanto. Sed baldaŭ li rimarkis sian „eraron" kaj petinte senkulpigon li adaptis sin al nia „kongreslingvo". La dua kiu eligis esperanto-vortojn estis frato Wigbertus; tio tamen ne okazis en la kunvenejo, sed en la restoracio. Laŭtvoĉe li preĝis „Patro nia—" kaj „Saluton Maria—", kaj la plimulto el ni laŭte respondis. Al tiu plimulto mi ne apartenis, ĉar kun

momenta honto mi konsciiĝis ke de neniu preĝo mi scias la esperanto-tekston. Sekve dum la manĝo min turmentis akraj konsciencriproĉoj, kaj mi profunde cerbumis pri la demando ĉu mi do estas malbona kristano kaj katoliko, aŭ nur malbona esperantisto aŭ eble eĉ ambaŭ....
F.L.E. kaj L.E.E.N. parolas nur esperanton dum siaj oficialaj kunvenoj. Ĉu ankaŭ K.U.N.E. tiel agas mi ne scias, sed N.K. kutimas paroli ekskluzive la nacian lingvon. Kiu pravas?
N.K. verŝajne bazas sian sintenon sur la konsidero ke esperanto estas internacia lingvo, destinita por rilatoj inter diverslingvanoj. Teorie tiu vidpunkto estas tute prava, kaj mi nepre malaprobus se oni uzus esperanton nur tial ke ĉiuj ĉeestantoj hazarde scias tiun lingvon. Ni kuraĝe supozu ke la membroj de ia nacia sindikato aŭ eĉ nur la anoj de ia kelkpersona sportklubeto subite faras la surprizan malkovron ke ili ĉiuj estas esperantistoj: tio neniel estus taŭga motivo por estonte paroli esperanton en ĉiuj kunvenoj. Sed kiam temas pri esperanto-organizo, do pri organizo kies membroj speciale unuiĝis por dediĉi sin al esperanto, tiam la uzado de esperanto inter samnacianoj estas ne nur ne ĝena, sed eĉ tute natura. Mi nenion scias pri „Alliance française", sed mi treege mirus, se tiu societo en siaj kunvenoj ne parolus la francan lingvon. Esperanto ne estas tiel facila ke por majstri ĝin sufiĉas partopreni dudekon da unuhoraj lecionoj. Estas bedaŭrinde sed vere ke niaj kluboj kaj landaj organizoj necesas ne nur por disvastigi la ideon pri universala planlingvo, sed ankaŭ por ebligi ke la membroj akiru la rutinon kiun ili bezonas antaŭ ol ili povas sukcese apliki esperanton por internaciaj celoj. Por multaj el ni la jarkunvenoj kaj naciaj kongresoj estas la ĉefa aŭ eĉ sola okazo por kontakti kun „samideanoj" kaj ekzerci sin en la parola uzo de la lingvo.
Jam kelkfoje mi aŭdis la rimarkon ke N.K. kvankam havante malmultajn membrojn, laŭkvalite okupas honoran lokon inter la naciaj organizoj, ĉar al ĝi apartenas relative multaj eminentuloj. Mi ne samopinias. La kvalito de N.K. ne dependas de la nombro da L.K.-anoj aŭ akademianoj kiuj apartenas al ĝi, sed sole de la lingvoscio de la tuta anaro. Ke F.L.E. kaj L.E.E.N. tiurilate rajtas kontenti kaj eĉ fieri, tion mi mem konstatis. Ĉu N.K. staras sur pli alta nivelo mi ne scias (la jarkunvenoj ne permesas konkludon), sed mi tre inklinas al skepticismo.

Oni povus oponi ke N.K. pli celas disvastigi esperanton ol perfektigi la lingvoscion de siaj membroj. Mi ne kontestos tion, sed kiu el tio konkludus ke ne gravas ĉu niaj membroj estas kapablaj esperantistoj certe eraras. La sperto ja montris ke sukcese kaj daŭre propagandas la lingvon nur tiuj kiuj vere okupadas sin pri ĝi. La interesiĝo kaj fervoro ordinare baldaŭ mortas se oni povas aŭdi kaj paroli la lingvon ĉiam nur en la sama malgranda kluba rondo (cetere multaj N.K.-anoj eĉ ne povas aparteni al loka klubo: inter po 10.000 nederlandaj katolikoj troviĝas apenaŭ unu N.K.-ano!). Precipe la komencantaj kaj nur duone instruitaj esperantistoj nepre bezonas — kaj plej ofte ankaŭ deziras — esperantlingvajn kunvenojn kaj kongresojn.
Kion mi do proponas? Unue ke niaj kongresoj kaj jarkunvenoj okazu almenaŭ parte en esperanto. La raportoj kaj protokoloj estu esperantlingvaj, kaj la diskutoj okazu dulingve, t.e. ĉiu parolu la lingvon kiun li opinias pli oportuna por nacia esperanto-kunveno. Se N.K. pli prosperus mi aldonus la proponon ke ni penu ke almenaŭ kelkaj eksterlandanoj vizitu niajn asociajn aranĝojn. Tiam forfalus ja ĉiuj skrupuloj pri la aplikado de internacia lingvo dum naciaj aranĝoj.
Mi ripetas ke mi tute ne estas esperanto-maniulo kaj ke sekve mi ne ŝatas senmotive uzi esperanton. Sed kiam N.K. kiel organizo kunvenas, tiam nek esperanto-prediko, nek esperantlingvaj raportoj aŭ diskutoj estas ridindaj kaj nenaturaj. N.K. estas unuiĝo de esperantistoj, kaj ĝi povas prosperi nur se ĝi dediĉas sin antaŭ ĉio al la lingvo. Esperanto ne fariĝu nia idolo kaj ni ne malkontentu se ne ĉiu deziras (aŭ kapablas) uzi ĝin en niaj kongresoj kaj kunvenoj. Sed aliflanke ni ne forekzilu el nia mezo la lingvon pro kiu ni ĉiuj aliĝis al N.K. Ofte mi aŭdis de N.K.-anoj mokajn kritikojn pri „la aliaj" kiuj uzas kaj misuzas ĉiun eblon por paroli esperanton kaj mi konfesas ke precipe la brua kaj reklamcela esperanto-konversacio meze de neesperantista publiko efektive ĝenas min, sed esperanto — organizo kiu ne parolas esperanton estas apenaŭ malpli ridinda ol filatelia klubo sen poŝtmarkoj.
Ni evitu la ekstremojn! W. MANDERS

Hangt in het kerkportaal van Uw parochiekerk reeds een propagandakaart?

BRULANTAJ PROBLEMOJ

En la lasta N.K.-numero aperis artikolo, verkita de nia eminenta samideano D-ro W. J. A. Manders, pri certa aspekto de nia movado, nome ĝia teoria strukturo laŭ la statutoj. Lia bonvola invito al sincera kontraŭkritiko sendube kaŭzos, ke multaj voĉoj, ĝis nun en konspirejoj flustrantaj, publike audiĝos, kaj ke torento de severa kritiko disbrulos en la ĉiam aferemaj, nepersonaj kolonoj de nia grizharula organo.
La eterna konservatismo, kiun diversaj junuloj en nia movado jam dum kelkaj jaroj spertis, kaj kiun s-ro Leideritz en la lasta jarkunveno rajte vipis, ankaŭ eble kaŭze de kelkaj sinceraj kritikaĵoj, tiu konservatismo formas la eluzitan spiriton de la maljuna ĉevalaĉo, kiu nomiĝas: „Nederlanda Katoliko", kaj senkonscie preparas la solenan enterigon de tiu ĉi iama kuranta junĉevalo helpe de bone sigelita ĉerko.
Ankaŭ D-ro Manders konstatis la malsanon, kaj kiel fervora samideano li serĉis kuracilon; sed laŭ mia modesta opinio ĝi ne taŭgas, donante eraran ideon pri la esenco de la malsaneco mem, kaj ĝiaj simptomoj.

La bazo de nia movado estas formata de du ideoj: katolikismo **kaj** esperanto. Kiel katolikoj ni ne povas disigi tiujn ideojn, ĉar la katolikismo estas plene harmonia vivkoncepto, lumanta kaj reganta ĉiujn niajn agojn kaj farojn, **eĉ la en si mem neŭtralajn.** Sendube, teorie la ideoj estas disigeblaj, sed praktike, kiel agantaj kaj farantaj homoj, ni ne povas agi neŭtrale. La teorie neŭtralaj agoj iĝas praktike: plaĉantaj al Dio aŭ ne. Tial ĉiu en si mem neŭtrala ago — ekz. fumado de cigaredoj aŭ kolektado de poŝtmarkoj — iĝas katolika, se farata de katolika persono. Tial katolika gimnazio povas akcepti ĉiujn ne-kontraŭ diajn verkaĵojn de klasikaj kaj modernaj aŭtoroj, ĉar la supernaturo estas konstruata supre de la naturo, kaj ne detruas ĝin. Tial ankaŭ tiuj verkaĵoj havas honoran lokon en la katolika edukiĝo, ĉar ili por katolikoj **ne** estas **neŭtralaj,** sed „katolikaj" verkaĵoj, tiusence, ke ili formas partojn de la katolika kulturo. La termino „katolika" estas tre erariga, posedanta diversajn sencojn: en la librovendejo ni ja povas aĉeti „neŭtralajn" kaj „katolikajn" librojn, sed la moralo (t.e. la etiko) rakontas al ni, ke teorie ekzistas neŭtralaj agoj, praktike ili tamen ne povas

ekzisti, ĉar ĉiu homo agas por aŭ kontraŭ Dio, kaj pro ĉiu el liaj agoj li estos juĝata.
Kompreneble, la koncepto de D-ro Manders pri la komprenaĵo „katolika" kondukas logike al la aserto, ke „flegi la internaciajn katolikajn interesojn" signifas: „uzi nian lingvon por **pure religiaj** celoj". Sed kial ni ne povus propagandi esperanton en nekatolikaj rondoj, ĉar nia statuto celas: progesigi la aplikon de esperanton inter la nederlandaj katolikoj?
Ĉu la katolika semajna gazeto „De Linie" ne flegas la katolikajn interesojn, flegante ankaŭ kelkajn ne-katolikajn interesojn? Ĉu tiu gazeto iĝas malpli konvena por katolikoj, ĉar ankaŭ nekatolikoj ĝin legas? Ĉu tiu gazeto iĝas malpli katolika, akceptante en siaj kolonoj ankaŭ ne-katolikajn eminentulojn? Sendube ne!
Sed en nia organo mi neniam renkontis Kalocsay, kaj aliajn eminentulojn. Kial ne? Ni ne invitis ilin! Kial ne?
Mi respondas: en nia movado regas la nefaremo kaj la fantomo de **la sektarismo!**

F. WINKEL

Pri la uzado de la refleksiva pronomo en Esperanto

I.

La rilato al la tria persono

La unua ĉefregulo estas konforma al la uzado de la refleksiva pronomo en la lingvoj latina, germana, franca kaj aliaj, sed en la slavaj lingvoj oni uzas la refleksivan formon ankaŭ por la unua kaj dua personoj. Dro Zamenhof, deveninta el slavlingva medio, kompreneble dum la unua tempo sekvis la slavan kutimon en kelkaj malmultaj frazoj.
Ni sidis, tenante **sin** koro ĉe koro (Unua Libro-1887!),
sed: ni sidis, tenante **nin** koro ĉe koro (Fundamenta Krestomatio, 326/17);
vi povos **sin** mallevi (La Esperantisto, Septembro 1890, Fundamenta Krestomatio, 50/11),
sed: vi povos **vin** mallevi (Fabeloj de Andersen, I, 61/14);
se ni povus porti ĉe **sia** flanko pafilegon (Hamleto, I-a eldono, 172/2),

sed: .... ĉe **nia** flanko .... (Hamleto, postaj eldonoj, 163/30). Aliaj ekzemploj: Hamleto 155/4, Readmono XXX/20.
La malmulteco de ĉiuj neregulaĵoj kaj la poste videbla korektado de ilia plimulto supozigas, ke ili estis hazardaj plumeraroj. Ke D-ro Zamenhof ne volis uzi la formojn „si" kaj „**sia**" por la unua kaj dua personoj, li apenaŭ povis pli klare montri ol per jenaj frazoj en la Fundamenta Ekzercaro (§ 18).
Mi amas **min** mem, vi amas **vin** mem, li amas **sin** mem, kaj ĉiu homo amas **sin** mem. — Mi zorgas pri **mi** mem; sed ŝi tute ne zorgas pri **si**. — Mi havas jam **mian** ĉapelon, nu serĉu vi **vian**. — Mi lavis **min** en **mia** ĉambro, kaj ŝi lavis **sin** en **sia** ĉambro.
La substantivaj vortoj **iu, tiu, ĉiu, kiu, neniu** apartenas gramatike al la tria persono, ankaŭ kiam ili rilatas al la unua kaj dua (en Esperanto same kiel en naciaj lingvoj).
Ĉiu el ni ricevas **sian** porcion. — Neniu el vi evitos **sian** sorton. — Se ĉiu vi .... lasus deŝiri al **si** .... unu pecon da karno post alia .... (Rabistoj).
Kiam „**sin**" kaj „**sia**" estas partoj de unu kunmetita vorto, ili povas rilati ankaŭ al la unua aŭ dua persono.
Homo, kiu emas **sin** gardi, estas homo **sin**gardema; ankaŭ mi estas (homo) **sin**gardema. — Via **sin**estimo devus reteni vin. Aliaj tiaj vortoj estas; **sin**dona, **sin**regema, **sin**detenema, **sin**kono, **sin**fido, **sin**oferemo, **sin**amo k.a., ankaŭ **sia**tempe [1]). Ĉe „—flanke" oni uzas „sia—" nur por la tria persono.

[1]) **Sia** en la formulo **sia**tempe perdas iel sian apartan signifon, kaj tiu kunmetita adverbo estas uzata por rilati al alio ol al la subjekto, kun la du signifoj: „**en konvena tempo**": tiam mi donos al via lando pluvon siatempe, Z; kaj: „**en la pasinta tempo**": ĉion li kreis bela siatempe, Z; la granda miro, kun kiu mi rigardis siatempe tiujn heroojn, Z; mi volis siatempe proponi komunan regulon, Z. Zamenhof eĉ uzis foje: „**en sia tempo**" laŭ la sama maniero; faru ĝin en sia tempo; sed tio estas evitinda, kaj la ĵusa ekzemplo estis korektita al „en ĝia tempo" en la Londona Biblio (Nombroj, IX, 3).
Sia fine akiras en kelkaj esprimoj la signifon de „sia propra", kaj tiam ne obeas la supre diritan regulon: tio okazas **aŭ** kiam ĝi rilatas kun: **ĉiu, ĉio**: metu ĉion en sian lokon; por ĉiu afero estas sia tempo kaj maniero, Z; al ĉiu sia propra estas ĉarma kaj kara, Z; al ĉiu sanktulo sian kandelon, Z; ĉiu sezono kun

sia bono, Z; — **aŭ** kiam ĝi kvalifikas substantivon ligitan al alia per la prepozicioj **kun, ĉe, apud** kaj esprimantan ties kutiman. distingan econ: ŝi rimarkis la reĝon de la maro kun sia krono, Z; ĉiuj dormis, krom la direktilisto apud sia direktilo, Z. (Vidu: Plena Gramatiko par. 288 bb kaj cc).

(Daŭrigota)

FRATER WIGBERTUS VAN ZON

Por pliprogresintoj

Por pristudi kaj primeditadi

SENTENCOJ DE SALOMONO

Ĉapitro XI

(Daŭrigo)

1. Kiu amas disciplinon, tiu amas scion;
   Sed kiu malamas admonon [1]), tiu estas malsaĝulo.
2. La virtulo akiras la favoron de la Eternulo;
   Sed kiu fidas siajn proprajn opiniojn, agas malbone.
3. Per malvirto la homo ne persistos;
   Sed la radiko de virtuloj ne ŝanceliĝos.
4. Brava virino estas krono de sia edzo;
   Sed senhonora estas kiel puso [2]) en liaj ostoj.
5. La pensoj de virtuloj estas justeco;
   Sed la konsiloj de malvirtuloj estas malico.
6. La paroloj de malvirtuloj minacas parencojn;
   La buŝo de virtuloj liberigas ilin.
7. La malvirtuloj renversiĝos kaj malaperos;
   Sed la domo de virtuloj staros forte.
8. Oni laŭdas homon laŭ lia saĝo;
   Sed kiu estas vanta kaj malsaĝa estos hontigata.
9. Pli bona estas homo negrava, sed laboranta por si,
   Ol homo, kiu serĉas honoron, sed al kiu mankas pano.
10. La justulo zorgas eĉ pri sia bruto;
    Sed la koro de malvirtuloj estas kruela.
11. Kiu prilaboras sian teron, tiu havos sate da pano [3]);
    Sed kiu forfrivolas [4]) sian tempon, stultulo estas.
12. La deziro de la malpiulo estas, ke la malvirtulo fortikiĝu;
    Sed la radiko de la justuloj estas neŝancelebla.

13. Per siaj pekaj vortoj kaptiĝas [5]) la malbonulo;
Sed la virtulo eliras el mizero.
14. Per la fruktoj de sia buŝo homo bone satiĝas;
Kaj laŭ la meritoj de siaj manoj homo recivas redonon.

[1]) admono = berisping;
[2]) puso = etter;
[3]) sate da pano = brood genoeg;
[4]) forfrivolas = verbeuzelt;
[5]) kaptiĝas = loopt in de val.

FRATER WIGBERTUS VAN ZON

JARKUNVENO DE N.K. (II)

Post ĉi tiu klara parolado aŭdiĝis kelkaj reakcioj. Montriĝis ke la kunveno bedaŭras la foriron el nia movado de tiaj figuroj kiaj Leideritz. La prezidanto aldonis ke Leideritz restos redaktoro de Nederlanda Katoliko kaj sekretario de N.C.K.E.

La jarraporto de la kasisto estis aprobata post kelka diskutado pri la formo.
En la komisiono por kontrolado de la kaso estis elektataj: Frato Ferdinandus el Alkmaar, s-ro Jordans el Bergen op Zoom kaj s-ro P. Verbeek el Hago.
Ili kontrolos la kason pri 1948 kaj pri 1949 antaŭ la venonta jarkunveno.
Labormaniero de la estraro. Ne estis multa kritiko kaj ĉi tiu ero de la tagordo ne postulis multan tempon.
Grava detalo estis la eventuala promesita kunlaboro en „Herstel". S-ro de Jong pristudos la laboristan gazeton kaj poste verkos serion da artikoloj en ĝi, espereble kun pli da sukceso ol Leideritz.

Proponoj (N.K. numero de Marto)

Apeldoorn:

I. kaj II. Malaprobitaj konforme al la avizo de la ĉefestraro.

Bergen op Zoom:

I. Aprobita.

II. Pro limigita nombro da interesiĝantoj la elekto ne facila. La sekcio Bergen op Zoom proponos ŝanĝon de la regularo en la sekvonta jarkunveno.

Eindhoven:

I. La propono estos prokrastata ĝis kiam oni parolos pri la deziresprimo.

II. Ĉiujare oni povas proponi ŝanĝojn.

Ĉu nia regularo estas reĝe aprobita? Tio ĉi ne estas konata kaj pro tio s-ro de Jong esploros la aferon.

Utrecht:

Se la kunveno akceptos la proponon, tiam ekzistas la danĝero ke ĝis nun aktivaj membroj fariĝos ne aktivaj. La ĉefestraro prefere volas stimuli la varbadon de familiaj anoj por tiamaniere plifortigi kaj pligrandigi la anaron. Do nia devizo estu: **Ĉu vi jam varbis familian anon?**

Propono de la ĉefestraro:

Kotizo *f* 4.—; aprobita kun tri kontraŭaj voĉoj.

Estrarelekto:

Kandidatoj: F-ino T. Durenkamp, s-ro Dercks kaj frato Arsenius.

Estis elektataj: F-ino T. Durenkamp kun 19 voĉoj kaj frato Arsenius kun 14 voĉoj. S-ro Dercks ricevis 5 voĉojn. La tuta nombro da voĉoj estis 19. Aplaŭdado por la du elektitoj.

Elekto de prezidanto:

S-ro de Jong ne reelektebla. Pro tio ke neniu el la aliaj ĉefestraranoj havis ambicion, la kunveno persvadis s-ron de Jong, forlasi sian starpunkton kaj ĉi tiu faris tion kaj estis reelektata por unu jaro. Li do denove estas prezidanto de NoKo.

Por faciligi la adresadon de la gazetkovriloj nomplatetoj estos farataj, por kiuj la membroj unufoje devos pagi *f* 0.15 kaj ankoraŭfoje tiun sumeton kiam ili transloĝiĝos.

La libera diskutado ne havis multan intereson kaj do ne postulis multan tempon.

La sekcio Amsterdam akceptis la inviton por la jarkunveno en 1950.

Je la 17.45-a la prezidanto fermis ĉi tiun interesan kaj espereble fruktodonan kunvenon per la kristana saluto.

La raportinto: K. J. VERNOOIJ

EEN NIEUW WOORDENBOEK

Esperanto-Nederlands en Nederlands-Esperanto

Bij de uitgeverij F. G. Kroonder te Bussum is de uitgave van een uitgebreid woordenboek Esperanto-Nederlands en Nederlands-Esperanto in voorbereiding, dat wordt samengesteld door G. J. Degenkamp, F. Faulhaber, Mr A. J. Kalma, W. F. Kruit en Dr W. Manders.

De namen van de samenstellers, die zich als vertalers en auteurs grote bekendheid in de Esperantowereld hebben verworven, waarborgen een werk, dat de gebruikers vol vertrouwen ter hand zullen kunnen nemen en dat zij zelden tevergeefs zullen raadplegen.

Ten aanzien van de juiste verschijningsdatum en een intekenprijs voor vooruitbestellers zullen in de pers nog nadere mededelingen volgen.

VAN DE BONDSPENNINGMEESTER

Op de jaarvergadering is de contributie voor alle leden op *f* 4.— per jaar gesteld. Bovendien is aangenomen voor één keer 15 cent meer te betalen voor de aanschaffing van adresplaatjes, door allen, en 15 cent bij iedere mutatie.

Individuele leden betalen dit jaar dus *f* 4.15. De afdelingspenningmeesters rekenen het bedrag à 15 cent per lid bij het derde kwartaal af, voor zover dit niet is geschied.

H. F. ROOBEEK,
Krugerlaan 195, Gouda

Giro 1 2 1 4 4 9 Nederlanda Katoliko Gouda

Oficejo „Esperanto ĉe la instruado"

C. Krusemanstraat 43 - Amsterdam - Zuid

Laŭ ricevitaj informoj, kies kompletecon mi bedaŭrinde ne povas garantii, Esperanto estas instruata en nia lando dum la lernjaro 1948—1949 en 22 (27) lokoj en 27 (32) diversaj lernejoj. El la lastaj estas 15 publikaj, 4 katolikaj, 4 kristanaj, 1 neŭtrala, 3 porinstruistaj seminarioj regnaj kaj 1 mezgrada ĝardenkultura lernejo regna. La instruado okazas preskaŭ ĉie post la ordinaraj lernejaj horoj en kursoj, nur esceptokaze ĝi estas oficiala kaj deviga. Ĝi estas donata de profesiaj geinstruistoj,

nur en unu loko de neprofesiulo. Jen diferenco kun la jaro 1938—1939, kiam plurfoje neprofesiuloj instruis Esperanton en kursoj por lernejaj infanoj.
La supraj kaj malsupraj numeroj interkrampaj rilatas tiun antaŭmilitan jaron. Enkalkulitaj en ili estas la tiamaj nombroj pri la blindulinstitutoj en Bussum kaj Grave, pri kiuj mi ĝis nun ne ricevis informojn.
Entute nun ricevas 203 (138) knabinoj kaj 353 (169) knaboj Esperanto-instruon, do 556 (307) geknaboj. La aĝoj varias inter 10 kaj 20 jaroj.

P. W. BAAS, prezidanto

La 19-an de majo la ministro por instruado, artoj kaj sciencoj akceptis tri el niaj estraranoj, kiuj petis informon pri la stato de la preparado de nova leĝo pri la porinstruistaj seminarioj. La ministro ne sciis, kiam la nova leĝo estos prezentata al la leĝdona delegitaro, nek povis doni informon pri ĝia enhavo. Li nur certigis ke li serioze konsideris nian deziron rilate la enkondukon de nia lingvo en la novan studprogramon.

P. W. BAAS

Examen-uitslagen

Amsterdam, 26 Mei 1949

Aangemeld voor examen B vijf candidaten, opgekomen vijf, geslaagd twee: mej. J. W. Dijkstra te Heemstede en de heer J. Londo te Haarlem.

Aangemeld voor examen A twee en veertig candidaten, opgekomen een en veertig, geslaagd zeven en twintig: de dames A. Heijblok—Bakker, J. J. E. Marjot, M. A. Sterk—Frielink en G. L. J. Stroomer te Alkmaar, A. E. Cevat, A. F. Schijff—de Haan en E. E. G. v. d. Sloot—Molman te Amsterdam, F. Huttinga te Beverwijk, A. Kaagman te Edam, J. v. d. Jagt—Grohist te Hilversum, H. C. Sillevis—Kool te Halfweg, C. H. Aafjes—Bruyn en H. Woudt—Vijver te Wormerveer en de heren Chr. A. N. Raassen en J. Slikker te Alkmaar, E. Larkens, C. A. ten Seldam en F. R. de Wit te Amsterdam, J. v. Achteren te Beverwijk, F. Blokland te Eindhoven, H Wernik te Haarlem, J. J. van Meningen en A. Put te Hilversum, R. M. de Kogel te Maartens-

dijk, W. J. C. Post te Wormerveer en J. Hooft en L. Driesten te Zaandam.

Groningen, 26 Mei 1949

Aangemeld voor examen B één candidaat, opgekomen één, geslaagd één: de heer K. v. d. Wal te Hoogezand.

Aangemeld voor examen A zes en twintig candidaten, opgekomen vijf en twintig, geslaagd vijftien: de dames W. A. Dijkema, H. Kiers en W. A. Wessels—Jansen te Groningen, K. Bloemsma—Jongsma, M. v. Leeuwen en B. Paul—Stuit te Leeuwarden, E. v. d. Schaaf te Nietap (Leek) en H. Roek te Nieuw-Roden en de heren J. J. Enuma, R. Korten, D. Wening en J. M. Wening te Groningen, T. Staal te Hoogezand, J. Kraai te Sappemeer en J. Bos te Veendam.

ĈEĤOSLOVAKUJO

„Multaj gesamideanoj deziras korespondi kun Nederlando. Volonte sendas al vi liston da adresoj kun detaloj Jac. Hakkennes, Rozenlaan 121b, Rotterdam-N.[2]. Petante alsendon bonvolu enfaldi poŝtmarkon por respondo."

Rondvojaĝo tra Ĉeĥoslovakujo

IV.

Tipa vidindaĵo, precipe en la urboj, estas viro malantaŭ infanveturilo. En la parkoj oni vidas patrojn kaj avojn promenantajn kun infanveturiloj, kelkaj etuloj dancantaj ĉirkaŭe; ofte iu brava paĉjo sidas dum horoj leganta sur benko kun la infanveturilo apud si. Tiu ĉi kutimo datumas nur de la lastaj jaroj kaj estas naskita el la manko de servistinoj: panjo estas tro okupita per la mastrumado kaj tial sendas paĉjon aŭ la avon por promeni kun la infanoj. Kaj kial fakte ne? Tio certe estas bona solvo de parto de la problemo kaj se en nia lando kelkaj bravaj viroj kuraĝus komenci, ankaŭ ĉi tie tio estus baldaŭ normala afero. Kaj vere, se oni iom alkutimiĝis, ĝi tute ne estas stranga afero! Ĉe la bonkora ĉeĥoslovaka popolo mi ĉie povis konstati varman simpation kaj sinceran intereson por nia patrujo. Nederlando ĉiam estis rigardata kiel malproksima fabela lando, kiu nun jam ne plu estas tiel nekonata: nia samideano prof. Jan Filip faris

multajn prelegojn pri nia lando kun lumbildoj kaj eĉ filmo kaj ankaŭ la grandaj pezaj ŝarĝaŭtomobiloj de A.T.O. estas oftaj, konataj gastoj. Mi eĉ vidis en Praha nederlandan duoblan blankan aŭtomobilon kiu en glacio alportis fiŝojn el nia lando. Ĉar ĝuste dum mia vizito al Ĉeĥoslovakujo okazis en nia lando la grandaj jubileaj festoj de Reĝino Wilhelmina kaj la kronaj solenaĵoj de Reĝino Juliana, oni kompreneble oftege kun intereso petis informojn.

Mi renkontis multajn Esperantistojn kaj povis konstati, ke la Esperanto-vivo tie estas tre vigla. La sekretario de la skriba Esperanto-kurso de Fratoj Filip rakontis al mi, ke en unu jaro pli ol 600 partepreninţoj faris sian ekzamenon, dum tiam ankoraŭ pli ol 600 estis studantaj, nur pere de tiu kurso (estas multaj aliaj okazoj por lerni Esperanton!) kaj estas okulfrapa afero, ke la kartoteko de la kursistoj enhavis la nomojn de preskaŭ nur intelektuloj. Broŝuro ĉeĥlingva de prof. Filip kun titolo „Katolikoj kaj Esperanto" estas trovebla en la libroŝranketoj en la preĝejaj vestibloj; miloj jam estas venditaj kaj ĝi liveris centojn da kursanoj. La granda vortaro esperanto-ĉeĥa de p. Filip, kiu denove aperis en Majo 1948 en 3500 ekzempleroj, en Aŭgusto jam estis preskaŭ elĉerpita; la dua parto ĉeĥa-esperanto aperos je la fino de Aprilo 1949. La helpepiskopo de Praha, Mgro. Eltschkner, kun kiu mi havis agrablan interparoladon, estas lerta Esperantisto kaj montris viglan intereson por la movado en nia lando. La ĉefepiskopo Mgro. Beran, kvankam mem ne praktikanta Esperantisto, tamen tre favoras la internacian lingvon; li rakontis al mi, ke jam lia patro estis Esperantisto antaŭ 40 jaroj. En diversaj urboj kaj urbetoj mi vidis afiŝojn, elmontrejojn, informejojn ktp. kiuj atentas, ke en Ĉeĥoslovakio Esperanto vivas. La Ministerio de Informoj eldonadas diversajn broŝurojn, belege ilustritajn, pri la Respubliko. Eble mi poste ankoraŭ publikigos kelkajn artikolojn pri diversaj vidindaĵoj en tiu lando, se por tio ekzistas intereso.

TRUUS DURENKAMP

AMSTERDAM

Op Zondag 1 Mei 1949 hield de Amsterdamse R.K. Esperantistenvereniging, A.R.K.E.V., de jaarvergadering in het parochiehuis van Sint Bonifacius. Na het goed verzorgde ontbijt

opende de heer J. Arts de bijeenkomst met de christelijke groet, waarna hij in het kort de belangrijkste gebeurtenissen de revue liet passeren. Tot onze grote spijt, aldus de voorzitter, is het voorgevoel van onze geestelijke adviseur bewaarheid geworden. Op 12 September werd hij benoemd tot pater-assistent van de rector van het Onze Lieve Vrouwe-gasthuis. Sinds korte tijd heeft Arkev weer een nieuwe adviseur, n.l. Pater Jacobs S.C.J. De verschillende agendapunten werden vlot afgewerkt.
Bij de bestuursverkiezing werden mej. J. Verkerk, penningmeesteres en de heer J. Bouman bij acclamatie herkozen.
De enige candidaat voor de functie van voorzitter, de heer F. N. Beemsterboer, werd met algemene stemmen gekozen. Wegens drukke werkzaamheden kon de heer J. Arts de functie van voorzitter, welke hij ruim tien jaar heeft vervuld, niet meer waarnemen.
Bij de rondvraag werd het Arkev-bestuur opgedragen via het „N.K."-blad alle leden en hun familie en vrienden te verzoeken er bij het bestuur van de K.R.O. op aan te dringen het esperanto in de uitzendingen te gebruiken. Speciaal werd er de aandacht gevestigd op de rubriek „Katholiek nieuws", verzorgd door de heer Paul de Waart. Wij dringen er bij de leden van „N.K." op aan een week na verschijnen van dit nummer met deze actie te beginnen. Als wij allen de handen ineen slaan, dan is de kans groot dat deze actie succes oplevert, maar .... dan moeten **allen** er ook aan meedoen. Afgesproken?!

G. DUIVIS, secretaris

Sanktaj Ansfried kaj Hereswit

III.

En tiu ĉi lernejo sankta Ansfried pasigis kelkajn jarojn, kaj tie tiel kondutis ke li estis la plej amata lernanto de Bruno. Tamen li tute ne supozis ke Dio destinos lin por plenumi altrangajn ekleziajn oficojn, pri tio li eĉ ne pensis; liaj deziroj rilatis nur al la militistaro. Kiam li havis dudek unu jarojn Ansfried forlasis la lernejon kaj kiel militisto li poste deĵoris proksime de imperiestro Otto I-a, certe rekomendite de Bruno.
Jam baldaŭ la nobla junulo pruvis siajn kuraĝon kaj virton.

En la aŭtuno de la jaro 961-a Otto kaj liaj militistoj transpasis la Alpojn por trankviligi la vivon en Romo, kie ĉiaj malpacoj minacis. Li elektis Ansfried kiel glavoportiston kaj dum la tuta militiro lia tendo sin trovis apud la imperiestra tendo. Lia konscienco restis pura dum la soldata vivo, kiu ne malofte estas senhonoriga.

En 965-a, post Pentekosto, ili revenis en Kolonjo kaj nun Otto rekompencis lin per riĉaj favoroj. Dank'al tiu imperiestra malavareco post kelkaj jaroj Ansfried estis unu el la plej riĉaj nobeloj en tiu tempo; multajn posedaĵojn li havis en Gelderland kaj Brabant. Tie, en la nuntempa lando de Belgujo, en la ĉarma valo, laŭlonge de la Maasbordo, sin trovas pentrinda Hoey. Iom pli malproksime oni vidas la landojn de la antikva Cassalum (nun Kessenich) kiuj sin etendas apud la maldekstra bordo de Maaseyck ĝis Roermond. Tiu ĉi fruktodona teritorio kun Kessenich, Neeritter, Thorn kaj aliaj vilaĝoj apartenis al Ansfried, kaj krome la graflando Testrebenti (Teisterbant) apud la riveroj Lek, Linge kaj Maas; plue sude de Maas la landoj de Heusden kaj Altena verŝajne ĝis Biesbos. [1]) En Theole (Tiel) jam en tiu tempo ekprosperanta komercubo, Ansfried havis sian lokon, sed prefere li loĝis en Driela (Dreyle), nuntempe Driel, kie la kreneloj de lia majesta kastelo leviĝis super la arbaĵo.

Sude de Maas kaj Waal, apud Testrebenti, la graflando Taksandrie sin etendis verŝajne ĝis Munsterbilsen. Antaŭe jam laboris tie ĉi sanktaj Lambertus kaj Willibrord. En tiu ĉi regiono ili fondis multajn preĝejojn kaj vilaĝojn, sed poste la Normanoj suferigis kaj prirabis Brabant. Ansfried forpelis la rabistojn; baldaŭ la detruitaj vilaĝoj releviĝis el la cindro, kaj denove tuta Taksandrie prosperis.

Liaj posedaĵoj pligrandiĝis kiam Ansfried tuj post 966-a edziĝis. Hereswit, lia edzino, grafino de Strijen en la lando de Geertruidenberg ne nur donis al li grandan teritorion; ŝi estis pia virino-kiel ni poste vidos-ankaŭ feliĉon ŝi kunportis. Kaj ĉiam pli klare brilis la suno de la ambaŭa feliĉo, precipe kiam naskiĝis filino, Benedicta kiu dum sia vivo estis rebrilo de la gepatraj virtoj.

(Daŭrigota) J. S. JANSEN

[1]) Laŭ v. d. Bergh (Kompendio de la meznederlanda geografio).

LA REĜO EN NURA ĈEMIZO

Fabelo de Godfried Bomans

Iris iam reĝo tra grenkampo. Li ne faris tion por nacia profito, aŭ ŝatante ekscii, ĉu la greno de liaj subuloj bonkreske prosperas. Li faris tion el nura plezuro. Estis ĝojige, ke ĉiuj tiuj grentrunketoj streĉiĝis nur ĝis liaj koksoj, kaj ke ili fleksiĝis ĝistere, ĉiam kiam venteto tuŝis ilin.
„Kiom potenca ja estas reĝo," li parolis ridete, „ne nur la homoj, sed ankaŭ la trunketoj fleksiĝas por mi. Ĉiu do scias, kie li pozicias en la socio."
Nun okazis, ke li dumpromene sentis la bezonon, kiun ni ĉiuj kelkfoje sentas. La reĝo serĉvidis ĉirkaŭen al kaŝita loko. Sed tiu ne ĉeestis. Nun lia okulo ekvidis la grenokampon.
„Nu," li diris, „tien mi eniros. Bedaŭrinde mi devas piedfrakasi kelkajn trunketojn, sed mi ja estas reĝo."
Ĉi-poste li pendigis ŝian ermenpeltan mantelon sur saliko, demetis sian kronon, kaj enpaŝis la grenkampon.
Post kelkaj momentoj preteriris terkulturisto.
„Hu, vi fripono!" kriis la terkulturisto, „kion vi faras tie?"
La reĝo kolerruĝiĝis; sed, ankoraŭ ne pretante, li pendsidante alrigardis la alian terurmiene.
„Ĉu vi ne povas paroli, bubo!" kriis la terkulturisto sovaĝkolere, „ĉu ne jam sufiĉas, ke vi piedfrakasis mian grenon? Ĉu vi devas ankaŭ malpurigi ĝin?"
„Ne tiel oni kutimas alparoli sian regnestron," digne respondis la reĝo.
„Malpurulo vi estas!" kriis la terkulturisto, alpaŝante al li tra la greno, „malĉastulo en ĉemizo! Kampkrimulo sen pantalono! For de ĉi tie!"
Kaj li vokis la aliajn terkulturistojn kaj kune ili pelis la reĝon bastonbate tra la grenkampo.
Ĉe la vilaĝa enirejo tamen kriis soldato: „Jen la reĝo! Respektu!" Kaj li reĝhonoris pafile.
La terkulturistoj haltis ekhonte kaj atendis kun fleksitaj kapoj sian kondamnon.
Tamen, la reĝo hontis pli. Li kaŝiris al sia palaco, kaj pripensis, ke sen ermena pelto li estis viro en ĉemizo.

Trad. FR. WINKEL